

NIA FOLIETO.

JAR A Abonprezo :

Enlande Fr. 1,25
 Fremdlande Fr. 1,75
 aŭ 7 respondukuponoj inter-
 naciaj, haveblaj ĉe la
 postoficejoj.

LA PROGRESO »

Esperanto-klubo

REDAKTEJO :

V. Hendriex
 Zalmstraat 43
 GENT — Belgujo.

KORESPONDADO :

Ĉiu dulinia anonco kostas
 du respondukuponojn.

Ĉiu abonanto rajtas fari
 unu enpresadon senpage.

Avizo al la kunlaborantoj : Ne subskribitaj artikoloj ne estas akcepteblaj. Se dezirinde oni aldonu pseŭdonimon publikigotan. Nur la subskribintoj restas respondaj pri la artikoloj enmetitaj. La artikoloj ne enseretitaj ne estas retrosendataj.

La "Zwalm",

En la montetoza regiono de suda Flandrujo fluas, bruetante kaj babilante la Zwalm. Je la ekigo ĝi estas sensignifa amaseto da akvo, kiu preskaŭ ne rimarkite sprucas el la tero kaj serpentfluante sur la vojo, formas kavon en kiu fajros-tonetoj kaj s-tonetoj, rug'aj, bluaj kaj grizaj, briladas.

Post kurba fluado, longa je kvar mejloj, la bela Zwalm kunigos siajn klarajn ondojn kun la malklaraj akvoj de la Skeldo, bruetadinte tiel pure, bele, sentime kaj gaje, balanciginte ĉiŝlanken, maldekstren kaj dekstren malrekte kaj rekte, antaŭen kaj malantaŭen, tiel kiel decas al vera rivereto. La Zwalm fluas de la montoj-la flandraj ardenoj. De la supraĵo de la arbaro de Schoorisse (Sh'oris), apud la arbaregoj de Vloesbergen, ĝi fluas de la deklivo, preter verda herbomonteto, printempe kovrita per miloj da primoloj, lekandetoj, anemonoj kaj vinkoj.

Tiel ĝi fluas, belete ornamita, al la valo kiel al kirmeso, kie multaj grupoj ĝin atendas. Malgrandaj kanaletoj, kaj akvoŭetoj de ĉiuj montetoj alfluas al la Zwalm kiel al pli agra fratino por ludeti kaj kanteti.

Ĝi fluas tra florantaj herbejoj, petole enfluas kreskaj etarojn, kantas sin malantaŭ arbetaj-ojn, ĉiam ludema kaj frivola. Tamen ĵu pli ĝi larg'igas, des malpli ĝi sajnias nesati la antaŭan serpentiron.

Ĉe la piedo de montetaro, ĝi fluas sufiĉe rekte, io kio estas artaĵo je rivereto. Sajnias kvazaŭ la Zwalm, nun plimaljuniginta emas igi pli serioza. Al la akvoŭetoj, kiuj grojante alfluas de la ĉirkaŭaj altaj-oj por petoli, ĝi sajnias flustri avertantan ust! kaj tiamaniere diri : ne estu vi tiel frivolaj ; ekrigardu kiel tiuj altaj montoj abrigardas nin kolereme kaj mokeme : dum la ĉeesto de eminentuloj oni devas esti bonmaniera.

Solena ja tie ĉi montigas la montetaro de Audenhove (Aŭdenhov) ĝis Rooborst (Roborst) ĉe la dekstra bordo. Montoj altaj je tri cent futoj, ĉu ili ne estas gigantoj

kompere al rivereto de Flandrujo? Ankaŭ la Zwalm pli grava ekaspektas. De Rooborst ĝis Munkzwalm ĝi fluas tra verdaj herbejoj, kviete, trankvile, sen murmurado, nek ondetoj, nek saŭmuroj. Knabo ne plu kapablas ĝin transsalti. Ĝi s'ajnas preskaŭ tiel larĝa kiel kanaletoj kaj estas plena je akvo ĝisborde. Sur ĝia ebena spegulo kuras folioj, grandaj kaj rondaj kiel teleroj. Jen kaj jen inter tiuj folioj altigas kaliko de akvolilio.

La Zwalm nun forlasas la herbejojn kaj fluas preter farmejo. Anasoj kaj cignoĵoj ĉi tie kaj tie glitas sur ĝia akvo. Tri fieraj blankaj cignoĵoj, veraj artistokratoj, nenion aŭdigas; ili estas ĉe tri fieraj rigardi pasanton, dum la demokrataj anasoj eligas sian malbelsonan blekadon... Sed kia bruo? Akvomuelejo! De malsupre supren renversigas la akvo super la mueleja rado kaj la kluztraboj en la malsupran lageton. Tie ĝi bolas silfetas kaj plaŭdetas ege. La helaj ondetoj estas disbatataj ĝis saŭmo, blanka kiel negro. Sed tie malsupre ili havas nun sufiĉe da spaco por kvietigi kaj seriozigi.

Preg-ejoj kaj muelejoj kun plac'o rigardadas de la altaj'o la fres-verdan valon de la Zwalm. Precipe la muelejo, kiu sur monteta pinto flamaspektas pro la somervarmego, sendube tro varmigas pro tiu forta skermado de siaj brakoj kaj nedube envas la sorton de la longa vico de popoloj ĉe la bordo de la rivereto, kie sendube estas vivige kaj gaje...

De nun la Zwalm fluas tra pitoreskaj ejoj, poeziaj anguletoj: unu pli alloga ol la alia. Tie ĉi ĉe la ponto estas tre altig'anta, nereкта vojo kundu vicoj de grandaj ulmoj kaj belega kampodomo kun ĉirkaŭanta ĝardeno. Sunfloroj kaj alecoj, sur siaj longaj trunketoj rigardas klinitaj super la verdaj barilo, kvazaŭ plac'emaj, ili volus montri sian belecon, al la preterirantoj. Pli malproksime, laŭlonge de la vojo kiun sekvas la Zwalm dum la longa distanco de Rooborst ĝis Nederzwalm dua muelejo, kie la rivereto dupartigas.

Longforma insuleto troviĝas sola en la mezo kaj estas kovrita per arboj kaj arboj kun jen kaj jen la malhela verdaj'o de abioj kun larikoj inter ili. Kelkaj babilonaj salikoj laŭlonge de la akvo donas al la tutaj'o melankolian sed poezian aspekton. Maldekstre, malsupre de la kluzo, sur kiu kuras trabego, estas profunda pitoreska lageto simila al tia de montoza lando. Enore'iga terloketo! Oni dezirus starigi tie budon dum la florsezono por admiri, revadi kaj ĝuadi, por vivi por la naturo kaj por si mem, vivi la plej noblan vivon animan!

La Zwalm ree ig'as baldaŭ pli larĝa kaj flustras preter arbaro kaj kampoj preskaŭ tute rekte aŭ kun fieraj kurbig'oj al la Skeldo, akceptinte unue dekstre la ondetojn de la kapricplena Boekelrivereto ĉe Nederzwalm, kies preg'ejetoj kaj domoj estas preskaŭ kas'itaj inter arbetaroj. La akvo fluo de la Zwalm preskaŭ finiĝas, baldaŭ ĉesos ĝia kantetado. — Tie spionas la Skeldo, meze de vastaj, verdaj herbejoj: baldaŭ ĝi ekkaptos la Zwalm enlutigos ĝin kaj kunportos ĝin en siaj malpuraj akvoj al la larĝa, larĝa maro.

OMER WATTEZ

Tradukis el Flandra lingvo E. Colijn

Oficiala Komunikado Esperantista Akademio

(51, rue de Clichy, Paris)

Dum majo lasta okazis elektoj de novaj Akademianoj. Estas elektitaj: S-roj Corret, Grosjean-Maupin, Kuhl, Privat kaj Warden. Estas reelektitaj S-roj Cart, Mybs kaj de Lengyel. La Akademio konsistas nun el la jenaj 14 personoj: Th. Cart, P. Christaller,

P. Corret, Evtistefjeff, A. Grabowski, E. Grosjean-Maupin, V. Inglada, E. Kuhl, P. Lengyel, D-ro Mybs, P. Nylen, E. Privat, A. E. Wackrill, J. M. Warden.

Ĉiujn detalojn pri tiuj reelektitoj oni trovas en numero XI (77) de Oficiala Gazeto.

Du Konsiloj al la Esperantistoj:

1° La Akademio konsilas, — krom en okazo de absoluta neceso —, uzi nur tiujn radikojn, prefiksojn kaj sufixojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro kaj en ĝiaj Oficialaj Aldonoj (Vidu Oficiala Gazeto).

Ĝi cetere nun preparas trian aldonojn al la Komuna Vortaro kaj organizos prilaboradon de teh'nikaj vortaroj kun helpo kaj kunlaborado de spertaj Esperantistoj kompetentaj en ĉiu teh'nika fako.

2° Aparte pri laudnomoj, ĝi insiste kaj forte konsilas, precipe al la Gazetoj, sed ankaŭ ĝenerale al ĝiaj Esperantistoj, uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon: ujo.

MILITO

Mi militon nomas murdo,
Jen lafer', sen argument';
Ne necesas serĉi pruvon
Ekster mia Testament';
Dio klare diris tion,
Ĉiu povas legi ĝin;
Kaj vi devos frue vigi,
Se vi volos trompi Lin

Epoletoj kaj plumaro
Ne pravigos tion ĉi;
Nek la s'afa imitado
Vin justigos antaŭ Li;
Se la glavon vi eltiras
Kaj en homon puŝas ĝin,
Ne la registaro kulpas —
Dio respondigos vin.

Kial iri al kunveno
Ĉiam en dimanc'maten',
Se konvenas falc'i homojn,
Kvazaŭ ili estus gren'?
Kvankam s'ajnas belaspekte
Ĉirkaŭstruti en galon',
Estas stranga Kristanceco
Traŭc'i gorg'ojn laŭ ordon'!(1)

(1) El « the Biglow Papers » de James Russell Lowell. Trad. M. C. B.

Kluba Vivo: Sinjoro kaj Sinjorino.

Kiam la persono kiu por reobteni sian garantiĝon momente foriras, la geludantoj interproponu du objektojn kutime vidatajn aŭ uzatajn unu kun la alia, ekzemple: la fingro kun la ringo, kadro kun portreto, piedo kun ŝuo, glaso kun biero, horlog'o kun ĉeno ktp. Supoza ke oni prenu tiujn ĉi lastajn. La foririnto revenas kaj ĉiu kuuldanto laŭvice devos ion klarigi pri la gesinjoroj; la horlog'o: sinjoro, la ĉeno: sinjorino. Unu diras: la sinjoro estas ege utila, la sinjorino ne estas necesa; alia: la sinjoro estas ordinare rondforma, la sinjorino longforma kaj tre fleksebla; tria: kiam oni prenas la sinjoron li senkompatkuntrenas la sinjorinon, kaj tiel daŭre ĝis kiam la divenanto, per la diraj'oj, povos diveni la objektojn. Tiu ĉi ludo estas bonega ekzerco.

Grava alvoko : Karaj c'iu landaj gesamideanoj.

Pli Esperanto estos disvastigita, kaj pli c'iu el ni profitos ĝin.

Jen kial ni permesas al ni proponi al vi nacilingve presigi, aŭ meti mem, per kanka stampilo, sur c'iajn viajn kovertojn kaj leterpaperojn, kaj sur c'iajn presarojn, la tri c'iajn subajn frazojn :

* Esperanto estas tiom praktika ke ĝi permesas korespondadi kaj interparoladi kun c'iajn alilandulojn esperantistoj, tiom bone kiom se oni konus ĝisfunde c'iajn naciajn lingvojn.

* Kaj ĝi estas tiom facila ke c'iu povas ĝin lerni *sola kaj sen instruanto*, dum la daŭro de nur kelkaj semajnoj.

* Senpagajn sciigojn inters'ange de postmarko por respondo. *

Tion farante, vi faros tre grandan servon ne nur al nia lingvo sed al vi mem. Ni ne bezonas do vin antaŭdanki. Sed ni plezurege certigas vin pri niaj plej bonaj sentoj.

Por la Beauvais-a Esperantista Grupo (Francujo-Oise).

La Prezidanto-fondinto : L. DEMARCY, leg'oscienca licenciato.

Hungarlanda Alvoko.

Post la dispecigo de Hungarlando, la antaŭe rika lando devas ekonomie ruinig'ri kaj anstataŭ povante pagi la militpagon postulitan per la packontrakto ĝi bezonus la helpon konstantan de la okcidentaj landoj.

El la agrikulture kulturita teritorio de Hungarlando estas :

22.303.620 akreoj plugteroj; 546.032 akreoj vinberoj; 5.754.506 akreoj pas'tejoj, kaj 12.641.939 akreoj arbaroj. Laŭ la packontraktoj 57, 1 % de la plugteroj; 31, 6 % de la vinberoj; 69, 5 % de la pas'tejoj; 85, 6 % de arbaroj venas sub alilandan regnadon. Dum 1919 kreskis en Hungarlando 25,9 milionoj metercentoj da tritiko. El tiu c'ia kvanto venas sur la teritorio postulata de Rumanio 5, 9 milionoj; de la Jugo-Slavo 5,7 milionoj; de la C'ehoj 2,9 milionoj kaj de Aŭstrio 0,4 milionoj. Do, laŭ la packontrakto restus al Hungarlando, kiel c'efe per terproduktoj kaj grenoj vivanta lando, teritorio sur kiu kreskas nur 11 milionoj metercentoj da tritiko. Ne parolante pri forpreno de 90 % da minoj, *per kio vivu* tiu c'ia malfelic'a lando, kies popolo certe ne estas kulpa pro la milito, ec' se kelkajn gvidantojn oni kulpigus pro ĝi!

En Budapeŝto estas 160.000 senlaboruloj, kun invalidoj kaj nelaborkapabluloj 240.000, kun ties familioj 500.000. 85.000 infanoj ne povis ricevi s'uojn! El 19.000 nov-naskitoj, pri 15.000 ne povis zorgi ilia patrino! Por 7.000 venis amonacoj el Svislando, sed 8000 ec' hodiaŭ estas vinditaj en papero kaj c'ifonoj.

Helpu! Kolektu mondonacojn! Sendigu nutraĵojn, amonacojn. C'io estas dankeme ricevata kaj distonata plej nunne al Esperantistoj!

Sendu al: Hung. Prop. Kom. de la L. I. Esperanto kaj Hungara Esperanto Servo.

P. Balkanyi: Hajos u. 15-II-2. Budapeŝto VI.

Komercistoj kaj Esperanto

Internacia Societo de komercaj oficistoj.

Konsiderante ke la c'iu faka oficistaro (komerca, industria, banka, k.c.) multege povas helpi la disvastigon de Esperanto, precipe en la komerco kaj industrio:

C'ar por plej bone atingi nian celon, ni devas interesigi la oficistajn societojn en c'iaj landoj:

C'ar aliflanke, la oficistoj Esperantistoj devas uzi Esperanton por internacie pri-trakti, ekster c'ia religia kaj politika demando, la moralajn kaj materialajn interesojn de la Oficistoj:

Mi opinias ke estas necese, fandi internacian societon de oficistoj kaj oficistinoj Esperantistoj.

1. La komercaj Esp. Oficistoj havos eblecon esti kun diversaj landoj en komercaj interrilatoj, ĝi helpas materiale, k. t. p.

2. Starigi Agentejon en c'iaj landoj kun la titolo: Esperanta Komerca Agentejo.

3. Devigi diversajn firmojn enkonduki en korespondado kiel internacia lingvo, anstataŭ fremdaj lingvoj nur Esperanton.

4. Eldoni specialan Organon, pri komerco kaj industrio.

5. Adreslibron de c'iaj oficistoj de la tuta mondo el komercaj, industriaj kaj fabrikaj entreprenoj, el Esperantaj firmoj, k. t. p.

Mi petas c'iajn gekolegojn, kiuj volas kunlabori por la efektivigo de mia projekto, ke ili respondu kiel eble plej baldaŭ, por ke mi povu prepari la aranĝon. Oni tiam elektos oficialan Direktejon.

Kun respekto,

ADOLF OBERROTMAN, V. D. de U. E. A.

Krak.-Przedmiescie 10-13 Warszawa Polujo,

Ni tre simpatias kun la celo de tiu c'ia alvoko, kaj tial, ni permesas al ni aldoni kelkajn rimarkojn.

C'iu ne estas bone kaj preferinde interrilati kun la nun en diversaj landoj ekzistantaj: Komitatoj por komuna Komercia Lingvo, kies c'efiniĉanto estas S^{ro} Marshall, Muirkirk Rd. 57, C'utford, London, S. E., Anglujo?

Eldoni organon estas ege malfacile nun. La oficistoj alprenu intern. Komercia Revuo'n kiel organon kaj kreu en ĝi rubrikon pri Oficista Edukado: k. t. p.

Kun deziroj, je bona sukceso, ni atendas la rezultaton.

N. F.

Internacia Foiro en Reichenberg (Bohemujo).

En la nova respubliko C'ehoslovaka nun ankaŭ okazos Internacia Foiro de la 14a ĝis la 22a de Aŭgusto 1920.

C'iaj fakoj de la industrio estos reprezentataj. C'iaj interesuloj tuj petu informojn al la Messeamt in Reichenberg, Wienerstr. 20. C'ehoslovakio, kie estas ankaŭ haveblaj acetankartoj kaj legitimacion, laŭ kiu la vizitonto ricevos rabaton po 50 % por la respublikaj fervojoj.

3a Internacia Foiro en Frankfurt a/M (Germanujo) okazos de la 3a ĝis la 9a de Oktobro 1920. Ĝia programo enhavas importon, eksporton, internacia inters'ango de komercajtoj. La specimen-ekspozicio enhavas 29 c'efgrupojn.

Detalajn informojn, prospektojn, k. t. p. oni petu al: Messeamt (Esperanto-fako) Frankfurt a/M Germanujo.

Bibliografio.



Gazetaro,

Sub tiu ĉi rubriko ni preparalos ĉiujn verkojn, de kiuj du ekzempleroj estos senditaj al la redakto.

Por unu ekzemplero anonco estos farata.

Respondo de la Hungara Scienca Akademio al la ĉeĥa Akademio — 13 paĝa broŝuro, sen montri de prezo nek de eldonisto, subskribita de la « Prezidantaro de la Hungara Scienca Akademio ».

Supre sur la unua paĝo staras la vorto « Esperanto » montranta ke la jena teksto estas verkita en la L. I.; (la Respondo eliris i. a. ankaŭ en Franca kaj Angla lingvoj).

Ĝi estas ekzemplo de Esperanto uzita en « praktika afero ». Estas tamen iom malfeliĉa praktika afero, ĉar ĝi celas trakti objekton kiu tute malkonsentigas du popolojn! Pri la fundo ni ĉi tie ne parolos, 1^o ĉar ni ne konas ĝin nete ankaŭ la tiel diritan « atakon » de la Ĉeĥa Akademio, 2^o ĉar al ni, Belgoj, estas malfacile vidi en la nuna situacio de la venkitoj ion alian ol « merititan punon » post ilia krima ago de 1914 kontraŭ la civilizacio ĝenerale, kaj kontraŭ nia maljuste kaj ne meritite atakita Belgujo speciale!

La Hungara Scienca Akademio do penas pravigi la konduton de Hungarujo okaze de la milito kaj tion ĝi faras en la Esperanta broŝuro per stilo ne tre facila nek ĉe tute sencerara! Ŝajnas ke la verkinto ne sufiĉe akiris la internacian stilon kaj tro sekvis tiun de sia gepatra lingvo. Tamen D^{ro} Zamenhof, en siaj « Lingvaj Respondoj » insistis pri tiu punkto kaj montris la diferencon inter Esperanta stilo kaj tro laŭvorta traduko el nacia lingvo. Cetere oni scias ke en Esperanto oni devas ĉiam esprimi logike siajn ideojn. Estas tamen ĝuste kaj juste diri ke la stilo de la « Respondo » ne estas tiel malbona kiel tia montrita de D^{ro} Zamenhof en la Lingvaj Respondoj.

Ĝenerale la frazoj de la « Respondo » estas iom konfuzaj, kelkaj ĉe malkorekte konstruitaj, oni rimarkas, ankaŭ la uzon de « tiel ke » anstataŭ « kiel »; uzon de akuzativo tie kie ĝi tute ne estas necesa, ekz. « apogi sur ion »; uzon de la adjektiva formo kun ciferoj por ne montri ordinalan nombron, ekz. « en la 1848^a slava kongreso », anstataŭ « en la slava kongreso de 1848 », k. c.

Korekta Esperanta stilo estas akirebla nur per la atenta legado de klasikaj tekstoj troveblaj ekz. en la « Fundamenta krestomatio », kaj ĉefe de tekstoj skribitoj de D^{ro} Zamenhof mem.

Tion multaj Esperantistoj tro ofte forgesas kaj malatentas, kaj estas malĝojige konstati tian mallertan uzadon de nia tamen facila lingvo, en momento kiam ĝi eble baldaŭ ekhavas triumfakirigan lokon en la scienca mondo! Kaj nin ne konsolas la ideo ke la franclingva eldono de la « Respondo », ne ŝajnas esti verkita en stilo pli korekta, re ni devas ĵugi laŭ la frazo: « Qu'est-ce que c'est qui reste pour les Hongrois » (!!!), spesita sur postkarto glitita en la broŝuron!

L. COGEN.

La Libro de Komuna pregno. Mimi, Ok Noveloj,

Ni kore dankas pro la ĵurnaloj ricevitaj:		
Amerika Esperantisto	June	Esperantista Ligilo
Argentina Esperantisto	Febr.-Majo	Esperantista Laboristo
The British Esperantist	June	Esperanto (UEA)
La Eklezia Revuo	Junio	Esperanto Mitteilungen
Esperanta Finnlando	Junio	Esperanto Triumfonta
		La Espero
		Jan- Junio
		Junio-Julio
		Junio
		Julio
		1
		Majo-Junio

Espero Katolika	Majo-Junio	Het Org. der Beweging voor een Christelijke Internationale	Mei 1920
Franca Esperantisto	— Junio	La Progreso	Jan. 1920
Letras	Junio 1920	pere de F ^{mo} Dorsinfang.	
Literaturo	Aprilo-Junio	La Studento (U. S. A.)	1, 2, 3,
Le Monde Esperantiste	Mai-Juin	Svisa Espero	Majo
Nederland-Esperanto	N ^o 86-93; 14; 57	Le Travaillen Esp.iste	Jun-Juillet
Nova Tempo	Junio-Julio		

ESPERANTISTA LABORISTO: Okpaĝa gazeto, redaktita tute per Esperanto. Redakcio: E. Adam, 24 Blvd. Beaumarchais, Paris XI, Francujo. Administracio: L. Glodeau, 177 rue Bagnole, Paris XX, Francujo. Senrezerve oni povas gratuli miajn socialistajn samideanojn, kiuj preskaŭ sen monrimedoj sukcesas eldoni gazeton pli kaj pli interesplenan. En la kvina numero ni legas nomojn de fame konatoj Esperantistoj: Ivan H. Kréstanov, L. Charles Baudoin (ĉe profesoro ĉe la Genova Universitato), kiel subskribintoj de artikoloj. Tamen la ĉefajlo estas traduko de ĉapitro el: « La Lueur dans l'Abime » (Eklumo en Abismo), ĵus aperinta libro de Henri Barbuse, la fama verkisto Franca, kiu lastatempe aliĝis al Esperanto.

Abonprezo 7.50 fr., sendotaj al S^{ro} Glodeau.

KRONIKO

ANGLUJO. — London: London'a Esperantoklubo, S^{re} Bride's Institute, Bride Lane, Ludgate Circus. Kunveno ĉiun Vendredon kun jena programo:

Julio 30: Muzika Vespero	} Aug. 20 Esperanto aplikita (H. Epstein)
Aŭg. 6: Esperanta Proverbaro (M. C. Butler)	
" 13: Arangoŝta	
	} " 27 Muzika Vespero.

FRANCUJO — Paris: La Societo: Komercio kaj Industrio per Esperanto, kunvenis kaj organizis 4 komisionojn, kiuj sin okupos 1^o pri propagando, 2^o pri teknikaj vortoj, 3^o pri instruado, 4^o pri gazetaro.

Ĉiujn lrede okazas kunveno de la Centra Paris'a grupo ĉe la Sorbonne.

La Socialistaj eksmilitistoj, fondintoj de la Societo A. R. A. C. (Association républicaine des anciens combattants: Respublika Asocio de la Eksmilitistoj), organizis, la 20an de Junio, grandan feston en Pavillon-sous-Bois. Bona sukceso! Grava propaganda tago.

Ni volas memori ke la prezidanto de A. R. A. C. estac S-ro Barbuse, fame konata. Valora fakto estas jena: Dum la unua semajno de Majo ĉiulandaj eksmilitistaj societoj estis kunvokitaj al Kongreso en Genève, por fondi la Internacion de la Eksmilitistoj. Laŭ propono de S-ro Fabre, Esperanto estis akceptata por la Internaciaj Kongresoj de la Internacio. Krom ĉiuj komitatanoj, multaj anoj ankaŭ lernas nun Esperanton.

PORTUGALUJO: En Portugalujo, Esperanto ĉiam kaj ĉiam sukcesas

La « Socialista Gejunularo » unuanime aprobis, dum nun el ĝiaj lastaj ĝeneralaj kunvenoj (pro propono de S^{ro} Pereira Junior kaj Pires Barreira) ke ĝia internacia lingvo estu Esperanto. Tiu decido devu troviĝi en ĝia regularo.

Lastatempe estis elektita ĝia nova « Administranta Komitato », kin konsistas el jenaj personoj: J. Pereira Junior (poreksterlanda sekretario) Kamos da Cuan (interna sekr.), Luiz Martius (kasisto), J. Pires Barreira kaj Manoel d'Abreu. Vieira (voĉdonuloj).

Tiu nova Administranta Komitato petas al ĉiuj socialistaj Gejunularoj el la tuta mondo, sendi al ĝi regularon, librojn, revuojn, ĵurnalojn, k. t. p. Ĝi ankaŭ deziras korespondadi Esperante, kun ĉiuj socialistaj organizajoj, kaj precipe, kun gejunularoj.

Ĉia korespondado devas esti sendata al: J. Pereira Junior, eksterl. sekr. de social. Gejunularo, Rua da Bemformoso 150-1^a, Lisboa Portugalujo. RIBELANTO.

BELGUJO. — Bruselo: Dimanc'o'n la 1^{an} de Aŭgusto 1920 okazis grava Liga Komitatkunveno en la kafejo: « A la côte d'Or », 23 Blvd Maurice Lemonnier (antaŭe Blvd du Hainaut). Sur la tagordo troviĝis i. a.:

La gravega propono de S^{ro} Paul Ollet pri kreado de Esperanta sekcio, ĉe la Internacia Universitato, starigota en Bruselo dum septembro venonta; Esperanto ĉe lernejoj; Propagandrimedoj; ekzamenoj por profesoroj Esp.; delegit-in-o ĉe la 12^a en Den Haag (Hago).

Gent: La Progreso: Pro la Liga kunveno la ekskurso al la Zwalm nur okazos la 8^{an} de Aŭgusto, anstataŭ la 1^{an}, kiel unue anoncite. Oni forveturos matene je la 8^h horo el la Suda Stacidomo, al Syngem.

Woluwe-St-Lambert: Blindula Grupo « Lumo en Mano » Direktoro: Fr. Ludoviko. Blindula Instituto: Blvd. Georges Henri, Woluwe-St-Lambert (Bruxelles).

Leterskatolo

Oni dezirus aceti kelkajn unuopajn malnovajn numerojn de Espero Katolika, Belg Esperantisto, kaj Belga Katoliko. Legautoj kiuj disponas pri iuj tuj skribu al la Redaktejo, pri kondiĉoj kaj numeroj disponeblaj.

MONFONDAJ O POR NIA FOLIETO.

	Fr. 85,85
F ^{no} M. Richez	» 2,00
De bedaŭrinda sennomulo	» 10,00
	Sume Fr. 97,85

Havebla ĉe la Redaktejo de „Nia Folieto“

Oni aldonu 10 % por la sendkostoj - 1 r. k. = 0,05 fr. sv.

Bela Manto: <i>La Dorna Karesilo</i> 1 fr.	C. G. Stuart Menteth: <i>Angla kaj Esperanta Etimologio</i> 4 r. k.
Ivan Krestanov: <i>El la Proksima Oriento</i> (Ruslandaj Respublikoj) 3,50 fr.	Bohema Esperanto Servo: <i>Adresaro de la Esperantistoj</i> 0,85 fr.
« <i>La Bulgara Lando kaj Popolo</i> 6,00 fr.	Jaroslav Ĉisar <i>Prezidanto Mazarijk</i> 1 r. k.

« Nia Folieto » deziras seriozajn kunlaborantojn kaj korespondant in-on en ĉiuj landoj.

La abonantoj kiuj ne ricevas « NIA FOLIETO » 'n estas petataj atentigi la redaktejon pri tio.

Eldonas: « LA PROGRESO »
Koophandelsplaats, 11 Place du Commerce,
GENT Belgujo GAND.